

Flandra Esperantisto



VLAAMSE ESPERANTISTENBOND
St. Klaradreef 59, BRUGGE




Tweemaandelijks Tijdschrift
28e Jaargang

mei - juni - juli - augustus 1961
Nummer 2 (296)

Demandu provveturon per
la nova

Ford Anglia

LA PLEJ BRILA EN SIA KATEGORIO



rekta distribuanto por Brugge kaj

ĉirkaŭaĵoj

GARAGE CANADA

GULDEN VLIESLAAN 68 BRUGGE

TEL. 34611

Flandra Esperantisto

Eldono de FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

REDAKCIO : Drs. F. Roose, Sinte Klaradreef, 59, Brugge - Belgujo
Tel. 319.81.

VLAAMSE ESPERANTISTENBOND

aangesloten bij **Universala Esperanto-Asocio**

VOORZITTER : G. Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.

SECRETARIS : G. Maertens, Prins Leopoldstraat, 51, Sint-Kruis
Tel. 349.35.

PENNINGMEESTER : Mej. J. Terry, Raapstraat, 72, Gent.

UEA-VERTEGENWOORDIGER :

Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan, 14, Blankenberge
P.C. 4161.35.

CORRESPONDENTIE-KURSUS :

A. Van De Velde, H. Pirennelaan, 25, Gentbrugge.

FLANDRA ESPERANTO INSTITUTO :

Blankenbergse steenweg, 72, Brugge. P.C. 3268.51.

Lidmaatschap :

Leden : 100 F (met inbegrip van het tijdschrift)

Steunleden : 150 F (idem)

Inwonende leden : 25 F (met inbegrip van "De Esperantist")

Jongeren : 50 F (onder de 21 jaar)

Abonnement : 75 F

Postcheckrekening 2321.50

van de Vlaamse Esperantistenbond te Gent.

Tarief van de aankondigingen :

(geldt alleen voor firma's, niet voor correspondentie-adressen)

1 bladzijde : 500 F (afmeting 20 × 12)

1/2 bladzijde : 300 F (afmeting 10 × 12)


1/4 bladzijde : 150 F (afmeting 5 × 12)

Daar het bedrag verschuldigd voor de aankondigingen die meerdere malen moeten verschijnen, gefactureerd wordt na het verschijnen der 1ste aankondiging, wordt op de voormelde tarieven de volgende vermindering toegestaan :

20 % voor een aankondiging die 3 maal wordt opgenomen,

30 % voor een aankondiging die 6 maal wordt opgenomen.

Verdere inlichtingen nopens de aankondigingen in het sekretariaat.



La reorganizo de la Esperanto-movada en Belgujo

Ni juĝas utile komuniki al la liganoj la rezultaton de la voĉdonado. Alvenis nur 2 malkonsentoj kaj inter la konsentoj estas 9 kiuj samtempe aldonas ĉu konsiderojn ĉu kondiĉojn.

La ricevitaj rimarkoj sin resumas jene :

- Statutoj kiel eble plej simplaj kaj larĝaj. (Interna regularo por la detaloj.)
- Nur unu klubo en ĉiu urbo. (Opinio el Leuven.)
- La aliĝintaj lokaj kluboj havu certan aŭtoritatecon.
- Unueco por la ĝenerala gvidado, sed ebleco por la flandra sekcio de la Federacio memstare agadi en la nederlandlingva teritorio de la belga ŝtato, kaj preni lokon en la vico de la flandraj kulturmovadoj.
- Eviti revenon al la situacio de antaŭ jaroj, kiam la flandraj esperantistoj estis konsiderataj kiel membroj duarangaj kaj akcenti la deziron de kompleta renoviĝo akceptante la nomon "Belganda Esperanto Federacio" aŭ io simila.
- Priatenti ke antaŭ kelkaj jaroj, post likvido de F.U.K.E., notinda nombro da Katolikaj esperantistoj aliĝis al F.I.L.E. kiuj ankaŭ deziras respekton de iliaj konvinkoj.

La estraro de F.I.L.E. konscias ke multaj problemoj — ne ĉiuj egale gravaj — devos esti solvitaj. Ĉiuj estas respektindaj kaj notindaj ; ni ne preterpasos ilin sen serioza ekzameno.

Dum la transira periodo, la kompleta estraro de F.I.L.E., same kiel tiu de R.B.L.E. eniros egalrajte la komitaton de la Federacio. Ni restos viaj reprezentantoj ĉe la centra organizaĵo kaj laŭbezone informos vin per cirkuleroj pri ĝia evoluo.

R.B.L.E. ankaŭ jam trafis gravan decidon. Ĉiuj sekcioj subskribis ekŝigleteron, tiel ke Belga Ligo fakte ne plu ekzistas pro manko de membroj kaj ke je fino de la jaro ĝi estos likvidita.

Ambaŭflanke ni agis nur kun la deziro enblovi novan vivon en la Esperanto-movado. Per unuigitaj fortoj ni klopodas denove konduki la internacian helplingvon sur la vojo de la progreso.

Kun via helpo ni sukcesos !

La Sekretario.
G. MAERTENS.

La Prezidanto.
G. DEBROUWERE.

Nova Mondlingvo : Neo

La legantoj de la belgaj gazetoj certe, la aliaj verŝajne ne jam scias ke ekzistas nova mondlingvo, nomata Neo. Ĝi estas la verko de 73jara, Itala komercisto, Arturo Alfandari, kiu depost 35 jaroj loĝas en Belgujo. Dum la pasintaj semajnoj aperis pri tio ampleksaj artikoloj kaj la verkisto sukcesis trovi tre konatan eldonejon : Brepols. Strange estas ke tiuj gazetoj, kiuj malfacile publikigas ion pri niaj lingvo kaj movado, nun subite disponigas kolonojn por tiu nura projekto. Kiuj influoj aŭ konsideroj ? (kaj, ĉu tio daŭros ?). La revueto "La Caravelle" estante "la vivo de la libroj ĉe Brepols" eldonis specialan numereton pri Neo. En ĝi ni legas intervjuon kiun prenis iu Luc Marchal de la aŭtoro. Laŭ tiu fonto A. Alfandari konas kaj admiras doktoron Zamenhof kaj Esperanton. Li opinias tamen ke la sukceso de esperanto estas tre limigita ; kaj la kaŭzoj de tio estas, laŭ A.A., la malbelsoneco ! Tiu malbelsoneco mem estas kaŭzita de la troa uzado de pre — kaj sufiksoj. Pro nur tiuj du motivoj, Alfandari laboris dum pli ol 20 jaroj al nova lingvo sen afiksoj ! La sekvo estas kompreneble ke la grandega verctamaso restas konservita en lia projekto, nome sesdek mil vortoj !! La sola avantaĝo de tio — laŭ A.A. — estas ke li forigis la pensadprocedon ĉe la uzo de tiuj afiksoj. Ke la forigo de tiu procedo estas pedagogia erarego, tion la aŭtoro ne pripensis.

Kaj nun la belsoneco. Juĝu mem. "Prego ol Akropol. Mi nasir, oh bluoka de'n, da eltros barbaras shel Cimeryanos bonas e viriuas ki abitar borde un mar skura, rokoza, sem batat pel craĝos. So ye konar apene i solyo, los floros ye sar nur maras muslos, alguos e koloras shelos ke so trar fonde solemas bayos." Al ni tiu teksto sonas certe ne pli bele ; sed tio povas esti ĉar ni ne kutimas aŭdi tiun lingvon. Tamen, en la supozo ke lia lingvo estus iom pli belsona (sed mi mem ne kredas tion), ĝi certe ne valorus la penon de dudek jaroj da laboro kaj de tiu giganta nova laborego, necesa por disvastigi alian lingvon. Cetere li estas malrealisto se li skribis (laŭ la sama fonto) : Instinkte la homoj turnas sin al tio kio estas pli bela. Tial mi estas konvinkita ke je la tago en kiu iuj superaj organizaĵoj kiel ONU aŭ UNESCO, aŭ unu aŭ du registaroj decidus fari teston tradukante centon da tekstoj plej diversaj en Esperanton kaj en Neon, tiu lasta iĝus granda venkanto kaj estus akceptata kun entuziasmo en la tuta mondo." (!)

Tiu jam maljuniĝanta sinjoro do ne ankoraŭ lernis ke tiaj superaj organizaĵoj fakte faras nur tiujn du demandojn, se ili foje volas alproksimiĝi al idealista movado : kiom da homoj kaj organizaĵoj vi reprezentas ? kaj : kiuj estas viaj atingaĵoj ? Ĉio alia ne interesas ilin ! A. Alfandari, kiu iom konas la historion de la mondlingva ideo, prezentas al si tutsimple la aferon tiel : Iam Volapük havis grandan sukceson. Tamen Esperanto venkis. Nun la pli bona Neo venkos E-on. Li ne priatentas ke la kaŭzo de la fina malvenko de Volapük estis ĝia mal-

facileco kaj do maltaŭgeco. Sed nun Neo troviĝas antaŭ facila kaj taŭga E-o, jam larĝe disvastigita tra la tuta mondo, en ĉiuj medioj. Por deni ideon pri la supraĵeco de la pensado de A.A. : li kredas ke se en nia lando oni instruus duan lingvon, facilan, kiu do, laŭ lia penso, solvus la lingvan konflikton, Flandroj kaj Valonoj tuj iĝus fratoj!

Estas ege bedaŭrinde ke S-ro A. ne pripensis ke per sia agado li ne gajnos multajn anojn, sed jes skeptikigos multegajn je la ebleco de mondhelpingvo kaj je Esperanto.

Post iom plia informiĝo, ni intencas sendi noton al la gazetaro. Povas esti ke tio estos jam farita kiam vi ricevos tiun-ĉi numeron en mano.

Drs. F. Roose.

LA BENELUKSA KONGRESO EN NAMURO

20-21-22 majo 1961

Pro diversaj kaŭzoj, kiujn ni tie ĉi ne plu volas pritraki, la prepara laboro por la Beneluxa Kongreso 1961 povis komenci nur tre malfrue kaj nur fare de L.K.K., kiu plej grandparte ne loĝas en la kongresurbo mem.

Tiu ĉi LKK konsistis el D-ro Pol Denoël, el Lieĝo, prezidanto; S-ro Pierre Piron, el Namuro, sekretario kaj F-ino A. Orsolini, help-sekretarino kaj S-ro R. Paulus, kasisto, ambaŭ el Charleroi.

Se la malfrua anonco de la Kongreso malbone influis la partoprenon, precipe de niaj nederlandaj amikoj kaj ankaŭ iomgrade en propraj rangoj, evidentiĝis tuj ĉe la alveno, ke la preparo tute ne suferis pro tuj specialaj cirkonstancoj.

Ĉe l'eniĝo de la akceptejoj, la "Taverne Pax", S-ro Paulus, tre grave ĉe tablo, kaj F-ino Orsolini, kun rideto, disdonis al ĉiuj ilian dokumentaron, entenitan en bela nigra mapo, donacita, dank'al F-ino Orsolini, de la grava industria societo ACEC.

Ek de la malfermo je la 15a horo, la kongresanoj rapide alvenis kaj je la 4a la tri prezidantoj S-ro H. Kervers, la nova prezidanto de LEEN, G. Debrouwere kaj M. Jaumotte invitis la ĉeestantojn, kuniri kun ili por demeti florgarbon, je memoro de la viktimoj de la milito.

Sekvantare, ĉiuj eliris kaj la flordemeto okazis antaŭ la monumento kontraŭ la deklivo de la citadelmonto. Ĉiuj, dum momento, pie pripensis la foririntojn.

Je la 17a horo okazis, prezidata de D-ro Pol Denoël, la prezidanto de la L.K.K., malferma kunsido. Li estis ĉirkaŭata ĉe la estrara tablo de la tri Ligaj prezidantoj kaj de la membroj de la L.K.K.

Li salutis la kongresanojn kaj deziris al ili plej agrablajn tagojn en Namuro. Li ankaŭ donis kelkajn teknikajn informojn pri la evoluo de la laboro kaj de la ceremonioj.

S-ro Kervers, prezidanto de LEEN, tiam senkulpiĝis siajn samlandajn samideanojn, kiuj nur malmultnombraj povis ĉeesti. Li diris sian ĝojon esti meze de la belgaj amikoj kaj esprimis la esperon en la daŭriĝo, sub lia prezidanteco, de la bonaj rilatoj inter la Ligojn en Beneluxo kaj en la sukceso de la proksimjara kongreso en Nederlando.

S-ro Debrouwere, prezidanto de Flandra Ligo, en sia salutparolado, aludis la intertraktadojn, kiuj okazis post la bona kunlaboro, dum la 45a U.K. por reunuiĝi la movadon en Belgujo, kaj S-ro Jaumotte konkludis per varma alvoko al amika kunlaboro inter ĉiuj.

Post la vespermanĝo, kiun ĉiu libere havis kie li emis, ĉiuj reunuiĝis en la salono de "Taverne Pax", je la 8a vespero, kie estis organizita, — precipe kun la helpo de la antverpena Grupo "La Verda Stelo" —, tuta programo, kunmetita el radiofcnaj teatraĵoj, kun lumbildoj, kaj turisma filmo, kun esperantaj klarigoj. Ĉiuj havis grandan sukceson.

HET WELGEKENDE
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING

in't duifken

GROTE KEUS
IN GEREDE KLEDING.

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN
UNIFORMEN - GARADINEN - LODENS
STIJLVOL MAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

Komuniko de la Libro-servo

Restas ankoraŭ kelkaj ekzempleroj de la "Elektitaj Noveloj" de la fama Flandra aŭtoro Lode Baekelmans. Prezo: nur 20 F.

Aperis en bela 127paĝa libro, kolekto de rakontoj de la mondfama Hinda aŭtoro Rabindranath Tagore, sub titolo "Malsata Ŝtono". El la Bengala lingvo tradukitaj de Lakshmiswar Sinha, Prezo: 160 B.F.

Kaj! Fine! Aperis ankaŭ en unu volumo la jam mondfama teatraĵo de Marcel Pagnol: "Topaze" kaj la egale bela "La Ŝipego Tenacity" de Charles Vildrac. Vidu recenzon en tiu-ĉi numero. Estas "Stafeto" eldono. Tio garantias belecon de aspekto kaj de enhavo! Prezo: 100 B.F.

Senprokraste mendu ĉe Flandra Esperanto-Instituto "BRUGGE", Blankenberge steenweg 72.

des pli ke tiu iniciativo eble montris la vojon al kelkaj ĉeestantoj, kiuj eble klopodos tiel pliagrabligh la vivon de la grupoj mem.

Grandan sukceson havis ankaŭ belega kolorfilmo pri Namuro, kiun projekciis S-ro Pierre Piron, kiu kun S-roj J. Verstraeten kaj Fr. Schellekens cetere prizorgis la tutan aparataron, necesan por tia prezentado.

Kaj estis jam la 11a horo, kiam tiu programo finiĝis.

La dimanĉo

La LKK estis prizorginta Di-servojn por la katolikoj en la preĝejo de Sta Jakobo, kie en nia lingvo predikis Pastro el Roeselare, kaj por la protestantoj en la templo de la Herbatte-bulvardo.

Je la deka, okazis la kutima solena kunsido de RBLE, sed ĉar la du aliaj Ligoj ne antaŭvidis kunsidon je tiu momento, ĉiuj kongresanoj ĉeestis tiun kunsidon, kiun prezidis S-ro M. Jaumotte, kun, je la estrara tablo, la Ligaj kaj LKK-prezidantoj kaj la estraranoj de R.B.E.: vicprezidantino J. Plyson kaj ĝenerala sekretario S-ro L. De Marré, kaj ankaŭ F-ino Terryn, kasistino de F.L.E.

S-ro M. Jaumotte kaptis la okazon por nun pli detale paroli pri la temo, kiun aludis S-ro Debrouwere, jam sabate, kaj donis klarigon pri la kunveno, kiun havis kvin delegitoj de ambaŭ Ligoj por reunuigi la movadon. Tiu komuna delegacio alvenis al unuanima konkludo, ke la plej bona maniero efektiviĝi la reunuigon estis la kunfandigo de ambaŭ Ligoj en unu nova "Belga Esperanto-Federacio", kiu, ekde nun, organizus la propagandon por Esperanto en la tuta lando.

La intenco estas ke tiu nova organismo estu estrata, ekde la vintra sezono kaj ankaŭ dum parto de 1960, de la kunigitaj estraroj de ambaŭ Ligoj, ĝis kiam, — meze de la jaro 1961, — povu esti kunmetata nova oficiala estraro, en kiu partoprenos membroj de ambaŭ nunaj Ligoj, kiuj emos vere dediĉi sin al la sukceso de la movado en nia lando, dum la sekvonta periodo.

S-ro Debrouwere tiam klarigis kiel ekestis la duigo de la movado en nia lando. Tiu skismo neniam kaj neniel estis direktita kontraŭ la valoncoj, sed estis kaŭzita nur de la speciala situacio, kiu ĝenerale regis en la lando antaŭ tridek jaroj. Tiu situacio funde evoluis en la lastaj jardekoj kaj tial estas nepre dezirinde, ke la neŭtra movado denove reunuigu kaj dank'al tiu reunuigo iru sian novan gloran vojon.

KONFITEJO „LA CIKONIO“

G. DENDOOVEN-DERIJCKE

LANGESTRAAT, 52, BRUGGE - TEL. 342.78

SPECIALAĴO DE BAPTO-SUKERO
LUKSAJ KAJ ORDINARAJ SKATOLOJ

S-ro Kervers, nome de LEEN, esprimis sian ĝojon kaj feliĉon pro la anoncita novaĵo. Li diras ke la Nederlandanoj, kaj verŝajne ankaŭ multaj aliaj ali-landanoj, neniam bone komprenis la kialon de tiu dueco: dum ili pli bone ol kiu ajn alia komprenas la gravecon, en malbona senco por la movado, de tiu divido, ĉar ili havas alian, sed ankoraŭ pli gravan dividon de la movado en propra lando. Li alvokis ĉiujn al kunlaboro en la nova kadro, kiu kiel eble plej plilarĝigu, i.a. per ankoraŭ pli funda kunlaboro inter Beneluksanoj.

S-ino Kervers, kiu estas prezidantino de la Haga Grupo, nepre deziris saluti la Kongresanojn nome de sia grupo, sed tamen precipe volis jam inviti ĉiujn al sia urbo, je Pentekosto 1961: ĉar verŝajne la proksimjara Kongreso okazos en la nederlanda registara urbo. Ŝi tre vigle parolis kaj akiris, — kiel cetere la antaŭaj paroladantoj, — varman aplaŭdon.

S-ro Jaumotte tiam ankoraŭ aplaŭdigis la nomojn de la jubileantoj de tiu ĉi jaro: post kio li, per laŭta alvoko de la nomoj, kreis la novan Honoran Kolonon por la Kongreso 1961, por kiuj jam kvardeko da membroj pagis sian kotizon al la du Ligaj kasistinoj, f-ino A. Terrijn kaj s-ino J. Plyson.

Kaj jam estis tempo por iri sekvantare al la Urbdomo.

Solena Akcepto en la Urbdomo

Je la 11a, la tuta kongresanaro eniris la urbdomon de Namuro, kie ili estis akceptataj en bela salono.

Pro foresto de la urbestro S-ro Huart, kiu, — same kiel la provinestro, — per speciala letero estis senkulpiginta sin, estis la skabeno pri Publika Instruado S-ro Pieltain, kiu akceptis la kongresanojn. Li estis ĉirkaŭata de diversaj urbaj konsilantoj.

Post mallonga prezento fare de la LKK-prezidanto D-ro Denoël, la skabeno bonvenigis ĉiujn kaj, per spritaj vortoj, memorigis pri lingvaj malfacilaĵoj kiujn li renkontis en iuj cirkonstancoj de sia vivo, nome en la armeo kaj rakontis kiel li tiam solvis ilin... iomete en la stilo esperanta, kiun li cetere konas, ĉar li iam komencis lerni nian lingvon, antaŭ multaj jaroj.

Li vidas tamen en Esperanto gravan helpilon por la paco al kiu ĉiuj esperas kaj kiu estas, ankaŭ por multaj esperantistoj, unu de la celoj de ilia klopodado.

S-ro Jaumotte unue tradukis, resume kaj esperantlingve, la paroladeton de la Skabeno kaj tiam, per la franca lingvo, dankis lin pro la bela akcepto. Li diris la ĝojon de la kongresanoj esti en Namuro, kiu meritas pli longan viziton kaj kiun li promesas reviziti de la esperantistoj, en alia eble pli longdaŭra okazo.

Kaj la honorvino, la cigaroj kaj bononoj baldaŭ agrabligis tiun solenan, tamen intiman akcepton, pri kiu ĉiuj plej bone memoros.

Dume, la pluvo riskis malhelpi la fotografajon kiu estis antaŭvidita, tuj post la akcepto, antaŭ la nacia monumento al la Reĝo Alberto kaj kiu efektive povis okazi en bonaj cirkonstancoj pro momenta halto de la pluvo, kiu poste rekomenciĝis por ne plu ĉesi dum la tuta posttagmezo.

Tiu neĉesanta pluvo malhelpis kiun ajn komunan aranĝon, sed la plimulto trovis en agrabla babilado, ĉe kafo, pasteĉo aŭ glaciaĵo, gajan kaj agrablan kompenson.

La Festeno

Verŝajne pro la pluvo, jam antaŭ la sepa, multaj kongresanoj eniris la salondon de la Hotelo "Victoria", kie okazos la festeno.

Dum plena horo, jam sidantaj ĉe la bele ornamitaj tabloj, ĉiuj gaje babilis, iomete kantis... Kaj kun granda apetito poste honorigis la bonajn pladojn de la festena menuo.

Ne estis honortablo. La ligaj kaj LKK-prezidantoj estis dividintaj inter si la duon — kaj neoficialan prezidon de la diversaj tabloj kaj la tostoj estis do kiel eble plej simplaj. D-ro Denoël dankis siajn kunlaborantojn; S-ro Jaumotte, nome de ĉiuj dankis D-ron Denoël kaj la tutan lokan kongresan komitaton. Li citis ĉies meritojn kaj aplaŭdigis ĉiujn nomojn.

S-ino Kervers ankoraŭ tutspeciale dankis la nuran Namuran LKK'anon, S-ron Pierre Piron, kiu tiel serveme helpis la nederlandan delegacion.

Dank'al al belete kunmetita kantlibreto, dank'al al surbendigo de kantoj, kaj dank'al agrabla danca parto, tiu festeno finiĝis en plej harmonia kaj varma atmosfero.

La lunda tago

Multaj timis pri la vetero por la lunda ekskurso, kiu celis la belegajn ĝardenojn de Annevoie.

Kiam la kongresanaro kunvenis ĉe la stacidomo, apud la aŭtobuso, kiu kondukos ilin al Annevoie, la vetero tamen estis ne nur seka, sed beleta, kun iom pala, sed tamen vera suno.

Kaj kiam oni alvenis en Annevoie, la vetero estis vere bela, tiel ke la promenado tra la parko kun la multaj fontanoj, estis plej agrabla: ankoraŭ pli agrabligita per interesaj klarigoj de lerta gvidanto.

Post la promenado, sekvis ripozeto en apud-moza kafejo kaj, iom post tagmezo, ĉiuj reiris kune al Namuro, kie surstrate S-ro Jaumotte diris ankoraŭ lastan adiaŭan kaj dankeman vorton al ĉiuj, kiuj kunlaboris al la sukcesigo de la Kongreso.

Kelkaj jam estis foririntaj dimanĉvespere aŭ nokte, aliaj deziris resti ne tro malfrue en la kongresurbo por eviti la tro amasan alfluan sur la vojoj kaj en la vagonaroj... Sed kelkaj kuraĝuloj tamen ankoraŭ restis, por admiri posttagmeze la Floren Sekvantaron en Jambes, sur la alia Moz-bordo.

Kiel ajn, ĉiuj ĝuis agrablajn tagojn en Namuro, kiun multaj ne plu detale vizitis de antaŭ multaj jaroj, ĉar la lasta tie okazinta kongreso datumas de 1924!

B.F.E.

Esperanto en la scienco

1) Centra tutmonda kolektado de sciencaj informoj kaj la problemoj de internacia lingvo

Sendube la laboro de ĉiu scienculo en la mondo estus multe pli facila kaj fruktodona, kaj sukcesus pli rapide, se ĉiuj sciencaj publikajoj el la tuta mondo ĉiunmomente estus haveblaj por li. Li tial povas enŭii la scienculojn de Sovet-Unio, kiuj havas je sia dispono la Instituton por Kolektado de Sciencaj Informoj el Eksterlando, bone servantan al ili. 2100 oficistoj kaj 20.000 okazaj sciencaj kunlaborantoj densigas ĉiujn artikolojn el 12.000 sciencaj gazetoj, same el 8000 raportoj pri sciencaj konferencoj kaj kongresoj, je amplekso de dek ĝis tridek linioj. Ĉiun duan semajnon estas presata po unu volumo da tiaj resumoj de eksterlandaj laboroj en ĉiu el la 16 sciencaj fakoj (fiziko, kemio, biologio ktp.) kaj sendata al la scienculoj de la koncernaj sciencaj fakoj en la tuta Sovet-Unio. Ĉiu volumo nombras 600-700 paĝojn. Se la sovetaj scienculoj aŭ institutoj trovas en la resumaj enhavolistoj verkon, kiu ilin speciale interesas, ili tuj postulas de la informa centro fotokopion de la originalo aŭ tradukon. Paradokse estas, ke usonaj sciencaj institutoj abonis la dusemajnajn volumojn de la sovetaj instituto, por ekscii, el Moskvo, kion oni povas legi en anglaj fakaj gazetoj. Moskvo kompreneble rifuzis la peton eldoni anglajn tradukojn de la informoj. Tial oni devas la ruslingvajn resumojn retraduki anglan!

Oni povus pensi, ke la registaroj de la aliaj landoj komprenus la gravecon de tia instituto por la sciencaj klopodoj de sia propra lando. La tieaj scienculoj plendas pri la ekstrene neperfekta informado pri eksterlanda scienca laboro. Kaj la tuta scienca mondo ekster Sovet-Unio ĉagrenas, ĉar neniu scias precize, kion faras la kolegoj. Estas tute klare, ke la starigo de Centra Tutmonda Instituto por Kolektado de Sciencaj Informoj estas tuja nepara neceso.

Sed ĉiu scienculo devus povi facile kompreni la informojn de tia instituto. En kiu lingvo do tiuj informoj devus esti publikigitaj? Ĉu eble ĉiu scienculo lernu la rusan lingvon por rapide posedi, kion li bezonas? Bedaŭrinde la

rusa lingvo estas tre malfacile lernebla por neslavoj, kaj nur post plurjara studado. Ankaŭ ĉia alia nacia lingvo estus rifuzata pro la konkurenco inter la nacioj. Estas la demando, ĉu ne ekzistas facile lernebla lingvo internacia.

Esperanto estas tiu facile lernebla internacia lingvo, kiun ĉiu scienculo, ofte ja scianta aliajn naciajn lingvojn pli aŭ malpli, kapablas facile lerni dum du ĝis kvar monatoj tiel, ke li ne plu trovas malfacilaĵojn ĉe ĝia legado.

Esperanto krome estas ekstreme klara, logika kaj kompare kun aliaj lingvoj kaŭzas nur malmultajn erarojn. Finfine estas eble, fiksi la signifon de vortoj per internacia interkonsento. Cetere Esperanto jam pruvis sin taŭga dum jaroj kaj jardekoj, en komercaj rilatoj, en konferencoj kaj ankaŭ por scienca laboro.

Estas tasko de l' esperantistoj kaj de la Esperanto-organizaĵoj, antaŭenpuŝi la ideon de tia Centra Tutmonda Instituto por Kolektado de Sciencaj Informoj kun la uzo de l' Internacia Lingvo. Mi petas precipe ĉiujn scienculojn de la esperantistaro, postuli en siaj gazetoj, en konferencoj kaj kunvenoj la fondon de tia mond-instituto por scienca informado per Esperanto.

Bruno Vogelmann.

2) Esperanto en sciencaj rondoj de Germanujo.

Sinjoro Prof. Hahn, la konata atomsciencisto ricevis la raporton de sinjoro Vogelmann, pri la taŭgeco de Esperanto. Kaj Prof. Hahn tuj donis la raporton al la «Max-Planck-Gesellschaft zur Förderung der Wissenschaften e.V.» (Asocio-Max-Planck, plej grava scienca instituto en Germanio), München 15, Goethestr. 31, kies direktoro, Dr. Ballreich respondis 31.1.61:

«Estimata sinjoro Vogelmann, Sinjoro Prof. Hahn donis vian raporton de 19a januaro al ni, ĉar ni pri-laboras ĉi-tie la fondiĝon de «dokumenta instituto». Certe la lingva problemoj havas la de vi vidatan gravegan signifon. Dum niaj pripensadoj ni esploros ankaŭ vin movantajn problemojn, kaj mi scias, ke la fakuloj funde analizos la eblecon uzi artefaritan lingvon por dokumentado, ek-

zemple Esperanton. Mi ĉiukaze tre dankas pro viaj instigoj. Kun afablaj salutoj mi estas via sindona Dr. Ballreich.»

La « Bundeskanzleramt » (ministerio de la germana kanceliero kaj ĉefministro Dr. Adenauer, skribis la 25.1.61:

« La kanceliero de la germana Federacio Respubliko kun intereso audis pri viaj klopodoj kaj ordonis fordoni vian raporton al la Ministro por internaj aferoj. »

3) Esperanto en sciencaj rondoj de Finnlando.

Vi jam legis novaĵojn, ke la plej grava germana scienca instituto. Max-Planck-societo por progresigo de sciencoj, intencas fondi internacian centron por scienca informado, kaj ĉe tio scilgis, ke ĝi volas serioze studi la eblecon uzi por koncernaj dokumentoj la internacian lingvon. Kaŭze de tio 22 sciencistoj el Finnlando sendis al la Instituto kuragiĝan leteron, opiniante, ke Esperanto plej bone servos por internacia scienca informado. La unuaj subskribintoj estas prof. Paavo Ravila, eksrektoro de la Universitato de Helsinko

kaj prof. Yrjö Väisälä, emerita profesoro de astronomio kaj fiziko en la Universitato de Turku (la sama, kiu jam antaŭ jaroj donis al du planedetoj la nomojn « Zamenhof » kaj « Esperanto »); ambaŭ estas membroj de la plej grava kultura instituto de Finnlando, la Akademio de Finnlando. Inter la aliaj subskribintoj estas eksprezidanto de la Scienca Akademio Finna, profesoro Vilho Väisälä, direktoroj de fakaj institutoj, profesoroj de finna lingvo, de fonetiko, matematiko, geodezio, internacia juro, filozofio, farmacia kemio, limnologio, rektoro de instruista atlernejo, ktp. Espereble aliĝos simile eminentaj sciencistoj el aliaj landoj al sama deziro.

Vilho Setälä.

Grava Rimarko

Se iuj de niaj legantoj havas bonajn rilatojn kun sciencistoj, estas konsilinde ke ili montru la leteron al ili kaj demandu ilian aproban subsignon. Ni povas doni kopion de la letero kiu estas en Germana lingvo kaj ankaŭ liston de la Finnaj sciencistoj kiuj subsignis.

La kolektanto internacia

estos revuo kolektanta pri ĉiuj fakoj; filatelo, numismatiko, alumetetiketoj, glumarkoj ktp. kun koncernaj rubrikoj servanta al la kolektantoj kaj helpanta facilan interŝanĝon. Tion klopodos la revuo per aperigo de la plej freŝaj informoj kaj ilustraĵoj; granda parto de la spaco estos pro tio dediĉita ĝuste al la anoncetoj pri la interŝanĝo, vendo aŭ aĉeto, al reklamoj-oferoj de la komercistoj.

La revuo ekkomencis sian aperon la 16-an de julio en vigle ilustrita vesto por esti alloga kaj utila ĉu al la kolektantoj, ĉu al la negocistoj. Ĝi enviciĝu en la fakaj literaturon vere reprezentanta internaciecon ĉu laŭ la karaktero, ĉu laŭ la lingvo. Ke tia revuo estas necesa pravas multnombraj instigoj, sed por plenumi sian rolon ĝi devos ĝui plenan kaj aktivan helpon de la kunlaborantoj (por vigligi la rubrikojn; el multaj landoj eblas ekz. informo pri noveldonoj de pm. nur rekte el sub la plumo de kunlaborantoj) kaj de la reprezentantoj-agentejoj, kiuj varbos la abonantojn en unuopaj landoj aŭ regionoj, kolektos anoncetojn kaj ofertojn de firmaoj kaj komercistoj. Sinsekve en la numeroj ties adresoj estos publikigitaj, sed cetere rekta abonigo aŭ mendo estos ĉiam danke akceptota.

La revuo en la unua eldonjaro aperos dumonate sur 24 paĝoj, formato A5. En la dua jaro la aperado estus jam monata.

Jarabono 125 F.

Anoncetoj pri korespondado, inteŝanĝo, (vendo aŭ aĉeto) por minimumo ĝis 25 vortoj aŭ mallongigoj: 37 F.

La l-a n-ro (provekzemplero) ricevebla kontraŭ egalvaloro de 25 F.

Adreso de la redakcio kaj administracio « LA KOLEKTANTO INTERNACIA », Ljubljana, poŝtfako 329. Esperanto-Ligo Jugoslavio.

Reprezentanto por Belgio: Iserentant Roger (F.E.I.), Blankenbergse steenweg, 71, Brugge.

MARKO SALUTAS LA AĴONJ

Tagon vireto kun ciklo sur vazo kun flor
vlor vlor

Tagon seĝo ĉe tablo
tagon pano sur tablo
tagon fiŝ-fiŝisto kun pip
kaj
tagon fiŝ-fiŝisto kun ĉap
pip kaj ĉap
de la fiŝo-fiŝist

tagon vi
TĀ-A-GON FIŜ
tagon kar-fiŝ
bonan tagon mia fiŝet

Tiun "versajeton" de la flandra poeto *Paul van Ostayen* (1896-1928) alia flandra poeto *Maurice Gilliams* (1901) jene komentariis:

La infano per unu ekrigardo, per pensosaltoj malkovras en mezo plej ordinara, novajn, intereseĝajn aĵojn: ĝi ankaŭ volas per ununura bildo (per unu vorto, per unu krio) ĉiujn ĉi aĵojn samtempe teni kaj nomi. Post la mola noktripozo la infano eniras la mirhelan atmosferon de la freŝa, trankvila ĉambro, en kiu ĝi malkovras la hieraŭajn aĵojn kun senfina krea mirego, kvazaŭ ĝi proksimiĝus al bordoj de (nekonata) mondo pere de seĝo, tablo, vazo kaj fiŝo. Poste venas la luda pensado pri la bildoj, la ordigo kaj la konsciiĝo. Apenaŭ murmuro ekprokraste surlipiĝas, kiu gustume ripetas la ludan ruliĝon de l'bildoj "pip" kaj ĉap" — de la fiŝo-fiŝist". Kun subite la jubila vekiĝo: TĀ-A-AGON FIŜ' kiel (nekonscia) resumo de prekaŭ himna belo. La finverso "bonan tagon mia fiŝet" ne plu estas de Marko, sed de la poeto mem, kiu versante pri la knabeto ne plu povis reteni sian emocion kaj per "mia fiŝet" celis ja la infanon. Per persona, neatendita akordo li finis sian lazuran sonatinon.

Tyneverum.

BELGLANDAJ STRANGAĴOJ


Post la lastaj elektadoj por la parlamento, diskoniĝis ke la kunveno de la Belgaj ministroj nun estis ekipata per kaptelefonoj, kiuj zorgos pri samtempaj tradukadoj.

Ke tiaj traduksistemoj estas uzataj en internaciaj kunsidoj ni ĉiuj scias; ke ankaŭ nacia registaro nun enkondukas tion, estos por multaj surprizo.

Sed la kialo? La unueca Belga ŝtato havas du lingvojn oficialajn: la nederlanda kaj la franca. Fakte tri, ĉar estas ankaŭ tre malgranda Germanlingva popolparto. Ĝis nun ĉiuj traktadoj en la ministra konsilantaro okazis nur franclingve, malgraŭ ke la Flandra popolparto estas la plej multnombra. Sed la Flandra publika opinio ne plu akceptas tion. Sekvo: oni devis akiri multekostan aparataron de kaptelefonoj por la traduko. Ĉar, 130 jarojn post la fondo de la Belga ŝtato, ekzistas ankoraŭ ministroj ne kapablaj paroli nek kompreni la lingvon de la popolo kiun ili devas administri. Plene en la racia, universtendenca 20a jarcento!!

Kaj nun la klimakso! Kiam pasintan someron okazis en Bruselo la universala Esperanto-kongreso — impona manifactacio kiu ilustras kaj efektivas la verajn egalecon kaj interpopolan amon — tiam la urbeŝtraro rifuzis akcepti nin kaj ne montris ian emon konatiĝi kun niaj lingvo kaj movado.

La mondo sciu kiaj spirite ne-evoluintoj regas ankoraŭ en la superciviliza Belga ŝtato.



RECENZOOJ



NIKOLA VAPCAROV: «**Elektitaj Versaĵoj**». El la Bulgara tradukitaj. Fremd-lingva eldono. Mendebla ĉe Bulgara Esperanto-Kooperativo, Str. 40, SOFIA; kaj ĉe «**Raznoisnoz**» Str. Asen 1, 1, SOFIA. Prezo 1 us. Dol.

Tiu sepdekpaĝa broŝuro prezentas en Esperanto-traduko tiel nomatajn poemojn de Bulgara palmortigita partizano. Ili donas la pensojn kaj la travivaĵojn de la heroo. Tiu literaturajo estas tre laŭcirkonstancia: priskribi la mizeran sorton de Bulgaroj en antaŭaj tempoj, la belecon de novkonstruataj fabrikoj ktp. Do, se tio interesas vin, aĉetu la verkon. Ni, Flandroj, scias ke batal- kaj tendencpoezio povas esti vere belega poezio, se vera poeto, pro interna psika premo, verkas ĝin. Ni pensu pri A. Rodenbach, Wies Moens, Ferd. Vercocke. Sed mi trovis neniun poezion en tiu-ĉi libreto. Mi ne pensas ke la traduko kulpas ĉi-foje. Ĝi estas tutsimple ne poezio. Jen unu ekzemplo inter tre multaj:

« Post li la forĝisto invadis,
kaj diris kolere:
ĉu vere, ho fraĉjo — li diris — ĉu vere,
ke li, la maljuna, jam mortis?
Mi staris rigida kaj diris malame,
kun tute sensenca malamo
ekkriis mi tamen:
mi, kara, instruis
vin esti konkreta,
kaj vi artifikas!
Nu, kiu do mortis?

Parolu!

Tio estas prozo; kaj eĉ malbona prozo. Tio estas despli bedaŭrinda ĉar ni sopiras al literaturo kiu estas foje io alia ol pentrado de dekadenca civilizacio kaj analizado de propraj egocentrismo kaj pasioj, kiuj tro abundas en la okcidenta hemisfero. Mi tamen devas diri ke kelkloke la priskribo estas bela.

Drs. F. R.

Infanliteraturo.

Les Editions Françaises d'Esperanto (Rue P. Vergnes 11 MARMANDE) eldonis serion de dek belegaj kajeroj kun tre multaj koloraj ilustraĵoj. Jen la titoloj: «**Kun niaj amikoj la bestoj**» — «**Aladino kaj la mirinda lampo**» — «**Kampomuso ekskursas**» — «**La Ratkaptisto el Hamelno**» — «**Eta plumba soldato**» — «**Pli kaj pli rapide**» — «**La kuraĝa Tamburisto**» — «**Orharulo kaj Ruĝakresto**» — «**Kaj nun ni Eklaboru**» — «**Vespero en la cirko**». Ĉiu presita kajero havas 12 paĝojn. La prezo estas nur dek novaj Francaj frankoj por la tuta serio. Jen io per kio la infanoj havos tre multe da plezuro kaj per kio ili lernos multe da Esperanto.

F.L.E.

WILLIAM AULD: «**Unufingraj Melodioj**» (kun skizo pri la aŭtoro de John Francis). En la serio de Beletraj Kajeroj eldonis «**Stafeto**» de Prof. Dr. J. Regulo-Perez. La Laguna — Kanariaj Insuloj (1960) — 128 paĝoj. Prezo: 1 Usona Dolaro.

Se mi rekomendas tiun-ĉi libron, kaj en la supozo ke sekve de tiu rekomendo iom da esperantistoj aĉetas ĝin, mi ne dubas ke multaj inter ili malbenus min pro tiu rekomendo. Post legado de ekz. «**Noktaj Pensoj**» ili ekkrios: «**sed tio ne estas poezio; tio estas spiritmalsanaĵo aŭ — nenormalaĵo!**». Ili troviĝos en ĝuste la sama animstato en kiu troviĝis tiuj artamatoroj, alkiutimigintaj al la klasikaj formoj kaj reguloj, kiuj unufoje vidas pentraĵon de Marc Chagall aŭ Salvador Dali. Kiel la du nomitaj pentristoj estas surrealistoj, tiel kelkaj poemoj de W. Auld estas surrealistaj. Kaj tio estas la unua afero kiun vi devas scii, kara leganto, antaŭ ol komenci la legadon de la poemoj de W.A. La surrealistoj pentras la sonĝojn kaj la internan, kaŝitan vivon de la subkonscio, kaj la sekretajn dezirojn aŭ strebadojn pri kiuj ofte la homoj ne konscias, sed kiuj tamen laboras en la homa psiko kaj kiuj influas la homon. La leganto klopodu foje ĝuste pentri unu sian revon aŭ priskribi ĝin. Poste li legu la menciitan poemon. Li ekkomprenos kaj ekĝuos ĝin. Estas dua afero kiun vi devas scii antaŭ ol ekataki la arton de W.A. Lia arto ne signifas kaj ne donas distraĵojn. Tre ofte kiam oni volas rekomendi poemaron, oni diras: vi bone amuziĝos aŭ trovos agrablajn distraĵojn. Se tion oni diras pri Auld, tio estus tutsimple trompo. Multaj de liaj poemoj havas profundan sencecon kiun oni kaptas nur post tre atenta legado kaj relegado. El tiu-ĉi kolekto multajn mi relegis eble dek fojojn kun intertempo de pluraj tagoj. Mi meditis post legado. Ofte mi eĉ haltiĝis je iu vorto. Nur poste evidentiĝas la beleco aŭ sencopleneo. Kaj tio ne plezurigas, sed spirite riĉigas. Kaj tio estas la frukto de la legado de la poemoj de W.A.: ili spirite pliriĉigas. Tria afero. Vera, talentgrandega poeto alportas iun mesaĝon al la homoj. Li estas personeco kiu multe pli profunde sentas ĉu la mankojn, ĉu la bezonojn ĉu ion alian de la homoj. Li devas ankaŭ esti personeco kiu kapablas esprimi tion! Kaj en bela formo! Nu, tia personeco estas W.A. kaj tia poeto li estas. Post kiam mi legis «**La Infana Raso**», liajn multajn poemojn en «**La Nica Literatura Revuo**» kaj nun tiun-ĉi volumeton, restas en mi ne plu eto de dubo pri tio. Tial vi devas legi, primediti kaj posedi liajn verkojn.

Notu bone ke tiu kiu skribas tiun-ĉi recenzon estas ideologie la kontraŭo de W.A. Tamen tiun ateston mi devas alporti. Estas tie-ĉi nek la loko nek la momento oportunaj por komenci ideologian debaton. Aliflanke mi devas ankaŭ konfesi ke ne ĉiujn poemojn mi komprenis aŭ ĝuis. Sed tio estas neevitebla. Restos ĉiam granda parto da subjektiva aprezado aŭ malaprezado en arto. Sed estas en la kolekto ankaŭ poemoj kiujn verŝajne ĉiuj komprenas kaj valortaksas. Ekzemplo: la tragika kaj eĉ multaj individuoj vera «**Unu el Ni**» en kiu poemo mi opinias nur banala la solan frazon «**L'edzinon kokri lin senzorge lasas**». (Sed tio estas mia strikte persona opinio). Alia ekzemplo: «**Kredo**» (paĝo 66). Alia afero: la nuntempa arto iĝis tiel malfacile komprenebla. Ni ne plu vivas en la antaŭaj jarcentoj en kiuj superregadis iuj ĝenerale akceptitaj principoj; tiel ke la arto — esprimado de sia tempo — estis relative facile komprenebla. Ne; ni nun vivas en tempo rapidege evoluanta; en krizo-tempo, en kiu oni repensas ĉiujn, antaŭe fiksaĵojn, valorojn. En tiu evoluego, ofte haŭsa, la homo ne plu trovas apogon, ne plu certecon; li oftege timas; li mem iĝis tre komplika. Sekve lia arto ankaŭ iĝis komplika. Ankaŭ ĉe tre multaj poemoj de Auld oni konstante faras al si la demandon: kial li skribas tion? kaj kial tion? kion signifas tio? Kaj eble Auld mem ne kapablas doni respondon. Ekz. Julio Baghy estas multe pli komprenebla, multe malpli komplika, pli virtuoza en la tekniko. Pro tio mi estas preskaŭ certa ke multo ankaŭ de la Auld-a poezio ne restos daŭre konservata en la historio de la poezio. Sed eĉ tiam povos okazi ke tiel perdiĝos pecoj kiuj vere estis altvalortaj, sed malfeliĉe ne komprenitaj. La enkondukita skizo de John I. Francis estas interesa kaj relative bone klariga. Sed tamen mi preferus biografion pri Auld de pli matura kaj pli penetra spirito kiel ekz. Prof. Dr. G. Waringhien. Mia konkludo, kiu estas, kiel mi jam diris, tiu de malsamsideano de W.A.: ĉiu kiu volas sekvi la evoluon de nia literaturo, devas posedi kaj legi la verkojn de W.A. kiu estas unu de niaj grandaj figuroj, kaj restos tia! Auld estas atestanto pri nia stranga, sed kiom interesa tempo; kaj ne nur atestanto, sed en iu senco ankaŭ profeto.

Drs. F. Roose.

MARCEL PAGNOL: «**Topaze**» kaj CHARLES VILDRAC: «**La Sipego Tenacity**».

El la Franca tradukitaj de Roger Bernard. Eldono «**Stafeto**» de Dr. J. Regulo en la Kanariaj Insuloj (La Laguna). 292 paĝoj. Prezo: 2 Usonaj dolaroj.

Ne malpli literatura ol la verko mem estas la biografia(?) noto pri la tradukinto Roger Bernard, sur la interna parto de la kovrilpaĝoj. Post ĝia legado oni havas larĝan ridon... sur la lipoj? ne, sur la tuta vizaĝo. Ni do pardonas ke la nekonita verkinto defendas la pozicion de la «it-istoj»; kaj entuziasme oni eniras la teatraĵon mem. (Kial tamen la verkinto ne sciigas kiun rolon ludis la patro de R. Bernard?) Despli entuziasme ĉar oni re-eniras la medion de la lernejo, tiu «dua hejmo» en kiu ni ĉiuj iam estis (Haec olim meminisse juvabit!).

Versajne malmultaj konservis en la posta vivo la primitivan imagon de la lerneja direktoro — la integreco mem, kaj de la instruistoj — kompetentegaj kaj karakterfortegaj. Se ankoraŭ ekzistas tiaj inter la legantoj, nu, jam post kelkaj paĝoj evidentigas ke la direktoro estas fripono kaj lia filino friponino. La teatraĵo tre bone montras la morojn postkulisajn kiuj ekzistas ja ankaŭ en la sfero de la instruado. De la instruado, el kiu Topaze estis forpelata malgraŭ ekzempla servado, li alvenas ĉe politikisto. Kaj tie la moroj estas ankoraŭ multe pli skandalaj, tiel ke li ricevas la honorigan ordenon sen ia ajn merito, kiun li en la instruado malgraŭ multaj meritoj ne kapablis akiri. Sed tiu infaneca naŭvulo Topaze trapasas «duran lernejon» kaj igas realisma, perceptema kaj «afer»-eca individuo kiu eĉ sukcesas forĉasi la malmoralan politikiston. Sed, kio restas de la moralo kiun T. mem antaŭe instruis kaj en kiu li kredis? Sendube Pagnol volis montri la distancon inter la moralo kiun oni instruas kaj tiu kiun la mondo praktikas. En tio li estas iom alia Voltaire kiu en «Candide» montras ke Leibnitz pravis(!) kiam li asertis ke «ĉio estas plej bone aranĝita en la plej eble bona mondo». La verko havas la meriton ke ĝi instruas nin pri la realeco de la vivo (cetere ĝi tuj havis grandegan sukceson) t.e. ke ĝi montras unu realan faceton. Efektive, ne kredu ke ĝi montras la tutan realan vivon. Tion faras, laŭ mia ideo, nur kelkaj eksterordinaraj aŭtoroj kiel ekz. Tolstoj. Ja, ekzistas en ĉiuj medioj esceptaj personecoj kiuj estas aliaj kaj kondukas alie ol tiuj priskribitaj en «Topaze». La verko havas ankaŭ la meriton ke ĝi kaptas nin. Ni havas nun ree teatraĵon kiun niaj kelkaj bonaj Esperantaj trupoj povas prezenti. Enscenigo tamen postulas tre multe.

Kelkaj rimarkoj ankoraŭ. Traduko estas ĝenerale bona kaj flua. La tradukinto uzas la vorton «nervoza» kiu estas, laŭ mia scio, Ido-vorto kaj ne Esperanto-vorto. (p. 145) Kial? Ĉu lin ne povis kontentigi la elekto inter nerva, nerveca, nervema? Mi ne vidas la plian precizecon de tiu nerv-oza. Estas konate ke ĝenerale oni atribuas kiel plejinfluan karakteron por Esperanto la facilecon kaj por Ido la precizecon. Mi konsentas ankaŭ ke kelkfoje Esperanto ne estas sufiĉe preciza... kaj, sekve, ke kompetentuloj iom plimalfaciligu ĝin. Tamen necesas la ĝusta mezuro. Tial la tradukinto ne pravigu sin per la argumento ke li ĉi-tie volis uzi vorton el la medicina terminaro. Kontraŭe, la leganto ne indigniĝu pro «povra» kaj «olda» ĉar, efektive, «pauvre homme» ne signifas malriĉa homo sed kompatinda, kaj «mon vieux» ne signifas maljuna sed «jam longtempe konata kaj simpatia». Sur paĝo 145 necesis piednoto. Tie Topaze havas konscienciproĉon post kiam li malmilde alparolis la tajpistonon. Li flustras: «Kaj en la tomb'okulo Kainon fiksrigardis». La tradukinto devis komuniki ke ĝi estas la lasta verso de la poemo La Konscienco el la «La Légende des Siècles, II» (La Legendo de la Jarcentoj) de Victor Hugo (1802-1885). Se la traduko de tiu verso ne estas de li, li devis skribi kie li prenis ĝin. Same, piednoto estas necesa sur paĝo 138 kiam Topaze kriis: «Ha, tiu interna lukto estas kornelieca!». Ĉu ĉiu leganto komprenas tion? Kaj kial ne, samokaze, en du tri linioj klarigi la diferencon inter Corneille kaj lia samtempulo Racine (17a jarcento)?

La multe pli mallonga «Sipego Tenacity» havis ankaŭ tre grandan sukceson. Mi komprenas tion facile. Kvankam en la komenco iom monotona kaj eĉ enuiga, ĝi igas je la fino tre interesa virinpsikologia studo; ankoraŭfoje tre instrua rilate la realon de la vivo. Kaj literature bela! Al la plimulto de niaj Flandraj legantoj, kiuj certe konas la Francan lingvon, mi devas konsili legi tiujn du verkojn en la originalo. Tamen estas bonega servo al la Esperanta literaturo kaj al la homaro, de kiu tamen nur malgranda parto konas la Francan lingvon, ke Roger Bernard tradukis kaj «Stafeto» eldonis tiujn literaturaĵojn kiuj apartenas al la tuteŝtara kulturposedaĵo.

Drs. F. R.

EDMOND PRIVAT: «**Junaga Verkaro**» — prologoj de Julio Baghy kaj de Kolomano Kalocsay. — J. Rĉgulo, Eldonisto, La Laguna, 1960 — 144 p.

Prezo: 1,20 us.dol.

Ni rekomendas precipe al novaj esperantistoj ĉi tiun beletran kajeron «Stafeto» per kiu reeldonigis kune konataj verkoj junaĝaj de Edmond Privat, la... profesora koro de Esperantujo kaj influinto de postaj verkistoj.

Malmultaj restis en nia mezo, kiuj mem aŭskultis lian paroladon en la Flandra Operejo dum la 7a U.K. en Antverpeno (1911) Li tie emfaze markis Esperanton vivanta lingvo kaj poezie konvinke antaŭdiris «Pri la Esperanta Literaturo» (originala) brilan estontecon.

La antaŭan jaron li estis verkinta triaktan lirikan dramon «Ginevra» laŭ keltdevena legendo, kun la konata noblatona

«Dum viroj pri milito ĉiam pensas,

Kaj gloron de l'bataloj preparadas,

Virina penso vidas la suferon

En hejmoj kaj en vivo ĉiutaga»...

En tia verko, kiel oni ĝin ankaŭ konas en la nacilingva literaturo el la sama tempo, oni sentas kvazaŭ la batalon de lirikisto kontraŭ la objektiva formo de la dramo.

Denove Antverpeno estis reprezentata ĉe la unua surscenigo dum la 9a U.K. en Berno (1913) La forpasintaj aktoroj Jules Verstraete kaj Hélène Bertryn ludis la rolojn de Lancelot kaj la Reĝino kaj partoprenis kiel amatoroj nia veterano Jan Jacobs («tre lerta, fortvoĉa Modredo») kaj la mortintaj pioniroj Oscar Van Schoor kaj Frans Schoofs.

Ke la nemultaj simplaj poemoj de Privat daŭre plaĉas, pravas ĉi tiu kvara eldono de «Tra l'silento» (1912) en kiu ni kun plezuro relegis «Lasta Kiso» kaj «Infanoj», delikatsentajn versaĵojn kiuj, kvankam ne bezonante la modernajn neologismojn, tiam tamen ne povis malhavi sufiksrimojn.

La libro ankaŭ entenas ses mallongfrazajn «prozajojn», fruajn specimenojn de la laŭdata klareco de la franclingva svivo Privat. Valéry iam skribis, ke la franca klareco tro ofte estas la klareco de... malplena glaso, sed ĉe nia aŭtoro lia kristala glaso entenas esperantan nektaron.

TYN.

JOHN FRANCIS: **Vitraro** — Prezento de Ferenc Szilagyi. STAFETO. La Laguna 1960 — 136 p. Prezo: 1,20 us.dol.

Ni ĝuis la dek artajn novelojn de Francis, kvankam lia prozo ne tiel flue legiĝas kiel tiu de Privat, verkita antaŭ duona jarcento (Vd. Junaga Verkaro) pro ĝiaj gramatikaj kaj senplivastigaj liberoj, necesaj fakesprimoj sed precipe tro oftaj certe en prozo nebezonataj novaj vortoj, kaj — kurioza fenomeno — ne aŭdataj en la «vivanta lingvo» de la «esperanta popolo». La neologisma naskorgano de niaj plijunaj aŭtoroj ŝajnas iomete hipertrofiita, tiel ke neinicito kelkfoje havas la impreson troviĝi antaŭ kriptogamo.

Tion dirinte — la lango prezentas kion la koro sentas — ni «hastas» konfesi ke Francis, la poeta aŭtoro de la makrokosmo (Vd. «Kvaropo») per sama talento nun en prozo sekcia senindulge la mikrokosmon, la homon.

Ĉiam nerekte atestante li ne elpaŝas la kadron de la rakonto, se ne iufoje en «Tuŝo de Morto» en kiu li verŝajne persone enmiksiĝis: «mia stomako krevemas kiam mi pensis pri la eksplodema monstro kvazaŭ prezentata al la artilerio». Temas pri milita aviadisto.

Kvankam lia verko estas esence intelekta, ŝajne senemocia, malvarmete brila, sentiĝas ĝuste la granda emocio inter vivo kaj morto por kiu nur perceptas tiun arkon, kiu igas ĝin drama («La Vidvino Pirsen», «Germoj en Rikolto»).

Per ironia, satira skeptikismo, kelkfoje humuro, li precipe per la groteskaj figuroj de la fabela «Juglando» (kvar noveloj) akurvide tuŝigas al ni la malmalbon kaj maljuston de la homa vivo kaj socio, kiu emfazas idealojn sed nur avidas personan profiton.

Supera fantazio («Kiel kaj kial Jurgen turniris por damo Liza»), plastika koncizo, precize pesita ekvilibro kaj densa kun kora bonfaremo de estetika karakterizas ĉi tiun «Kolorvitraĵon», kies figuroj ŝajnas malpli koloraj ol tranĉe konturitaj.

TYN.

Een spotgoedkope autogids voor Duitsland.

Ieder jaar bezoeken tienduizenden Vlamingen de Duitse Bondsrepubliek en dat is gemakkelijk te verklaren. Het land ligt naast de deur; alles is er «gründlich» georganiseerd en de vreemde toerist wordt er korrekt behandeld. Land met romantische rivierdalen, ruïnes en burchten op de heuveltoppen, abdijen en kloosters, ideale autowegen, heide en meren, parelende wijn, schuimend bier, ontroerende volksliederen, rijke musea, indrukwekkende bergmassieven... kom, het hoeft niet allemaal meer opgesomd. Bij de keuze van een reis- of vakantieoel hoeft op Duitsland niet meer speciaal de aandacht gevestigd; elke reislustige Vlaming komt er als het ware vanzelf, ik zou haast zeggen onbewust, voor een korter of langer verblijf of op doortocht.

Het moet dan ook niemand verwonderen dat de Vlaamse Automobilistenbond niet kon achterwege blijven met de uitgave van een degelijk en toch handig reisboek over dit interessante buurland. Zo werd dan naar de kopij van de door de voorzitter van de V.T.B. en de V.A.B. terecht geprezen zeer bevoegde Dr. L. van Egeraat, een Noordbrabander, een «Autogids voor Duitsland» in het licht gegeven. Deze autogids (17.500 km op de mooiste wegen van Duitsland) geeft een toeristische beschrijving van gans het grondgebied van de Bondsrepubliek volgens een modern en zeer praktisch stelsel. Aan de hand van 48 gebieden, met in elk gebied een ideaaltoer (voorzien van kilometrische afstands-aanduiding), die de interessantste weg is tussen twee plaatsen, maken we kennis niet alleen met de bekende en dus overvloedig bezochte steden, maar ook met vele kilometers voor ons Vlamingen werkelijk onontdekt gebied. Buiten deze ideaaltoeren zijn er nog 19 mooie aanvullende rondritten in de buurt van de bekendste centra voorzien. Alle plaatsen en hun merkwaardigheden, benevens landschappen en door de mens geschapen kunstwerken, worden nader verklaard naargelang ze op de beschreven weg voorkomen. Praktische wenken aangaande keus der auto-kaarten, hotels en restaurants, kampeergelegenheid, ideaal reisseizoen, bijzondere gerechten en zwemgelegheid ontbreken niet, evenmin als een gebruiksaanwijzing voor de gids, een register op de plaatsnamen, 23 stadsplattegronden en 48 kaartjes van de ideaaltoeren. Deze 290 bladzijden (16 × 25 cm), verlucht met tientallen foto's en tekeningen, in een fraai geplastificeerd vierkleurig kaft, zullen onschatbare diensten bewijzen aan hun bezitters.

Dit enig standaardwerk, onmisbaar voor de verkenning van ons oostbuurland, is slechts te koop voor de leden van de Vlaamse Toeristenbond en de Vlaamse Automobilistenbond en wel uitsluitend in de V.T.B.-boekhandels te Antwerpen, Brugge, Brussel, Gent, Hasselt, Kortrijk, Leuven en Mechelen tegen de spotprijs van 50 F, te vermeerderen met 7 F, indien toezending over de post verlangd wordt. Leden kunnen ook bestellen door storting of overschrijving op P.R. 936.27 van de Vlaamse Toeristenbond te Antwerpen.

Een nieuw V.A.B.-hoofdlid, dat in 1961 aansluit, ontvangt, mits betaling van 200 F in plaats van 155 F, eveneens deze gids; een nieuw V.T.B.-hoofdlid betaalt 175 F. Stort hij het bedrag op voornoemde postrekening, dan dient er 7 F voor verzendingskosten bijgevoegd.

Dezelfde Autogids voor Duitsland wordt in Nederland tegen 12,50 gulden verkocht!

NOVA EFG/PHILIPS-GRAMOFONDISKO N-RO 004 NUN estas havebla!

Ci-foje ĝi prezentas: «MEMORAJOJ JE BRUSELO».

Ili estas kantitaj de la «HORO DE ESPERANTO-FILMO-GERMANUJO» sub gvidanto de muzikdirektoro Hermann Kirchner.

La disko enhavas: La popolkantojn «Tik e tik e tok» (itala) kaj «Sari Marejs» (sudafrika), el la opereto «VALSREVADO» de Oskar Straus la valson kaj la kanto de «Vilja» el la opereto «La Gaja Vidvino» de Franz Lehar.

La operetajn kantojn tradukis Joachim Giessner (EFG).

Se vi deziras posedi ĝin, sufiĉas, ke vi sendos al ni po disko la sumon de nur 7.50 Germanaj Markoj per poŝtmandato al nia adreso aŭ al nia poŝtekkonto: Biernath, Hannover n-ro 2096 23 aŭ al banko: Biernath, Deutsche Bank AG, Braunschweig n-ro 5386.

Se la disko eble ne plaĉos al vi, bonvolu resendi ĝin nedifekta al ni post plej malfrue 10 tagoj, kaj vi senprokraste ricevos la tutan sumon al ni ĝiritan.

SEMINARIO «ORIENTO - OKCIDENTO»

sub aŭspicioj de U.E.A. kaj de la Londona Esperanto-Klubo

University College London, Gower Street, LONDON, W.C.1... 24.VIII.1961

Korespondadreso: 1, Post's Road, Highbury, LONDON, N.5, Britujo.

PROGRAMO

Merkredo, 2. aŭgusto:

- 09.30 Malfermo de Seminario: N.R. Smith, B.Sc., Wh.Sc., A.M.I. Mech. E.
10.00 La aktuala laboro de UNESKO en la realigo de la Granda Projekto «La Reciproka Aprecado de Orientaj kaj Okcidentaj Kulturaj Valoroj»: Prof. D-ro I. Lapenna, «Research Fellow» ĉe London School of Economics and Political Science, antaŭe Profesoro de Internacia Juro en la Universitato de Zagreb.
11.15 Eŭropano rigardas Japanujon:
Lic. Tibor Sekelj, konata esploristo, verkisto kaj vojaĝinto.
12.30 Paŭzo por laŭvola lunĉo.
14.00 Impresoj de Libano, Etiopio kaj Aliaj Landoj de la Proksima Oriento:
D-ro P. Neergaard, antaŭe Profesoro en la Usona Universitato de Bejrut.
15.15 Libera Diskuto: «Problemoj en la uzado de Esperanto de Orientaj popoloj kaj ĝia apliko al la Reciproka Aprecado de Kulturaj Valoroj»: enkondukos N. Barnes, B.A., Lingvisto antaŭnelonge reveninta el Ĉinujo.
17.00 Bendoj de Azia Muziko kun klarigoj.
19.30 Renkontiĝo en la Antaŭkongresa Akceptejo ĉe Royal Hotel por kuna ekiro al Ĉina Restoracio (proksimuma kosto 15 ŝil. sen trinkaĵoj).

Ĵaŭdo, 3. aŭgusto:

- 09.30 La influo de la Okcidento sur la pensmanieroj de Japanoj:
Prof. D-ro Hideo Yago, Rektoro de Universitato de Okayama.
10.15 La Kulturo de Hindujo:
Lic. Tibor Sekelj.
12.00 Film-prezentoj kun Esperantaj komentarioj.
13.15 Kuna ekiro al lunĉo en Hinda Restoracio (proksimuma kosto 10 ŝ.) (aŭ lunĉo laŭvole)
15.00 Kultura Renaskiĝo en Ĉinujo:
N. Barnes, B.A.
16.30 La influo de Okcidenta Kulturo en la Proksima Oriento:
D-ro P. Neergaard.
18.00 Fermiĝo por libera vespermanĝo antaŭ partopreno en la Antaŭkongresa Balo.
Vendredo, 4. aŭgusto:
19.30 Renkontiĝo ĉe la Akceptejo de la Antaŭkongreso en Royal Hotel por kuna vizito al la Brita Muzeo (Orientaj Sekcioj).
12.30 Lunĉo laŭvola.
14.00 La Prahistorio de Afriko:
Lic. Tibor Sekelj.
15.15 Libera Diskuto: «La rolo de Esperanta tradukita kaj originala literaturo en la Interŝanĝo de Kulturaj Valoroj»: enkondukos V. Sadler, B.A.
16.30 Fermo de Seminario.

Lastmomenta aldonajo: La Seminario inkluzivos ankaŭ prelegon de D-ro Rokuro

Makabe (Japana): temo decidota.

Seminarianoj rajtas ankaŭ partopreni kiun ajn programeron de la Antaŭkongreso, kiel alternativon. **Kotizo:** 75 ŝil. (150 steloj), kiu inkluzivas loĝigan servon, sed ne la koston de loĝado, manĝado ŝu ekskursoj. Por havi aliĝilon, skribu tuj al la Sekretario ĉe 1, Post's Road, Highbury, LONDON, N. 5, Britujo.

Dokumentoj

KUNVENO PRI LA RILATOJ INTER INTERNACIAJ KONGRESOJ KAJ GAZETARO

La Kunveno okazis la 23-an de junio 1961 en Parizo, en la palaco de la Asocio Francujo-Ameriko sur la bulvaro F.D. Roosevelt, en la kvartalo de Elizeaj Kampoj. Ĝi estis organizita de la GEGOS (Generala Komisiono por Scienca Organizado), kiu invitis min prezenti la ĉefraporton pri miaj spertoj kiel KKS. La kunveno estis aranĝita sur tre alta nivelo: estis invititaj nur gravaj internaciaj organizaĵoj kaj kongresspecialistoj. Estis reprezentitaj, inter alie, Unuiĝo de la Internaciaj Asocioj, pere de la vic-prezidanto kaj de la vic-ĝenerala sekretario (speciale venis de Bruselo), Internacia Komerca Cambro kaj la franca Ministerio PTT. U.N.E.S.C.O. estis reprezentita pere de sia Departamento por Informado, en la personoj de S-ro Y. Leguen kaj F-ino Tabbush.

Dum la honora tagmanĝo antaŭ mia prelego, unu el la temoj estis Esperanto. Du francoj, kiuj konis parizan pioniron de la Internacia Lingvo, interkonsentis difini lin kiel ekstravagancon (« un fou, mais adorable ») kaj klopodis apliki tiun difinon al ĉiuj esperantistoj. La reprezentanto de UIA tuj emfazis, ke en la lastaj jaroj Esperanto atingis gravajn rezultojn: la atmosfero turniĝis al simpatio, kiam mi klarigis la uzon, kiun mi faras de Esperanto en mia familio, ne pro principo aŭ fanatismo, sed pro simpla neceso.

Dum la kunveno mi prezentis ne nur la rezultojn atingitajn de miaj Kongresaj Gazetaraj Servoj en diversaj jaroj, sed ankaŭ studon pri la maniero kiel granda centreŭropa gazeto, Frankfurter Allgemeine Zeitung, dum unu jaro (oktobro 1959 — oktobro 1960) pritraktis la naciajn kaj internaciajn kongresojn. La eseo, originale verkita en la franca, estis de mi kunmetita dum 21 monatoj, dum liberaj horoj. Subbaze de statistikoj kaj analizoj, la eseo pri-

traktas la influon de la faktoroj tempo, temo, loko, kvanto kaj elito en la rilatoj inter kongresoj kaj gazetaro. La enketo vekis tre grandan intereson kaj estis difinita de la Prezidanto kiel grava kontribuo al la sociologio de la informado. Resumo estos sendita, fare de la CEGOS, al ĉiuj interesitaj institucioj kaj aperos en la revuo « Associations », oficiala organo de UIA, kiun ricevas ĉiu persono en la mondo, kiu okupiĝas pri internacia organizado.

La diskuto, kiu sekvis, daŭris multe pli longe ol estis antaŭvidite kaj eĉ post la fermo de la kunveno formiĝis grupetoj, kiuj plue debatis la temon. Nur unu persono (usonano) parolis angle, kaj lia interveno kaŭzis grandan embarason, ĉar la stenografistino de la kunveno ne konis tiun lingvon kaj ne sciis, kion protokoli, dum la aliaj personoj (francoj kaj belgoj) evidente volis eviti debaton en la angla. Ambaŭ reprezentantoj de UNESCO plurfoje prenis la parolon:

UNESCO mem opinias sin bonŝanca, kiam ĝi povas akiri 4 liniojn en la plej grava franca gazeto: ĝiaj teknikaj konferencoj havas tiel malgrandan eĥon, ke multe pli bone estus ne okazigi ilin aŭ aranĝi, ke Ministroj diru la samajn aferojn anstataŭ specialistoj nekonataj al la granda publiko. Tre interesa estis la raporto pri la metodoj de la Eŭropa Agentejo pri Produktado, kiu liveras gazetarajn komunikojn en 22 mil ekzempleroj. UNESCO posedas ampleksan adresaron de gazetoj kaj ĵurnalistoj tra la tuta mondo, kiun oni rajtas konsulti en Parizo: ĝi estas dividita ankaŭ laŭ la fakoj, pri kiuj la apartaj ĵurnalistoj interesiĝas. Estis traktitaj ankaŭ la problemoj pri gazetaraj komunikoj, gazetaraj konferencoj, decentrigo de la informado kaj de la kongresoj, ekonomiaj kaj politikaj premoj. La kunveno konstatis, ke la interesiĝo de la gazetaro al internaciaj manifestacioj estas malsufiĉa (1,9 % de la jara spaco). Prila demando estos ŝarĝitaj kompetentaj organizaĵoj, kiel la Internacia Instituto de la Gazetaro, CEGOS, UIA kaj UNESCO. Tiamaniere la indiferenteco de la gazetaro, kontraŭ kiu baraktadas nia Movado, estas lokigita en la kadro de pli larĝa problemoj, pri kiu ek de nun okupiĝas instancoj kun adekvataj aŭtoritato kaj rimedoj.

Dum la tuta kunveno Esperanto estis en la centro de la atento, ne kiel lingvo, sed kiel Movado, kiu havas tiom da sperto pri fakaj internaciaj problemoj. Post la Fermo, La Ĝenerala Direktoro de la CEGOS, S-ro Milhau, diris al mi, ke li estas impresita de la ekonomiaj avantaĝoj de Esperanto dum internaciaj konferencoj, kaj li demandis, ĉu estus preferinde enkonduki ĝin en ĉiujn lernejojn aŭ ĉu estus pli bone komenci ĝian instruadon al kongresaj delegitoj.

La CEGOS organizos aliajn similajn kunvenojn, kiuj iom post iom pristu-

dos ĉiujn aspektojn de internacia kongreso: kiam la lingva problemoj eniros en la tagordon, tiam estos preparitaj la kondiĉoj por la sukceso de Esperanto.

Mi sendas la tekston de mia eseo al la Informa Fakoj de UEA, kiu decidus pri la oportunecon konigi ĝin, tute aŭ parte, al la Informaj Fakoj de la Landaj Asocioj.

G.C. Fighiera,

Konstanta Kongresa Sekretario.

FAKVORTAROJ.

Ekzistas jam multaj de tiuj tre bezonataj specialaj vortaroj, kiuj havis ĉetere tiel grandan sukceson ke pluraj jam elĉerpigis. La « Esperanto-Press » Oakville Ontario CANADA nun reeldonis kvar tiajn, nome « Muzika Terminaro » de M.C. Butler kaj F. Merrick; « Terminaro por Infanludoj » — « Kudra kaj Trika Terminaro » de M. kaj V. Verda; kaj la « Radio-Terminaro » de A. Venture. Ĉiu el ili kostas nur 4 stelojn.

Firma Van Iseghem & Verstraeten,

P.V.B.A.

ST BERNARDSE STEENWEG, 631 HOBOKEN

VITRALOJ - SPEGULOJ - „SECURIT“ VITRO
KOLORIGITAJ VITROJ
ALUMINIAJ SENMASTIKAJ STANGOJ POR
KUPOLOJ

VITRO-CEMENTO POR TUTVITRA-KONSTRUJAĴOJ
MASTIKO

telefoon 37.88.20

INTERNACIA KORESPONDA SERVO

Amikiĝo inter homoj de diversaj nacioj estas dezirinda celo, tamen neatingebla por la plej multaj homoj, ĉar ili ne scias ian alian lingvon. Al tiuj homoj volas helpi la IKS-servo.

IKS-Landa-Ofico akceptas leterojn de ĉiu en sia nacia lingvo, tradukas ilin esperanten kaj sendas ilin al fremda lando, kie la tiea Landa-Ofico plu-tradukas en la nacian lingvon de la ricevonto. Tiu pagas nenion. Nur la forsendanto pagas malgrandan sumon, por ke ankaŭ junuloj kaj malriĉuloj povan leterŝanĝi.

La IKS-Centra-Ofico en Craiŝheim organizis reton de Landaj-Oficoj kun perantoj (kiuj tradukas kaj peras adresojn) en multaj landoj, ĝis nun en Algerio, Austrujo, Egipto, Finnlando, Francio, Hindujo, Israelo, Italio, Japanio, Suda-Koreujo, Svedujo, Svisujo, USA kaj Germanio. Ni serĉas kunlaborantojn en ĉiu lando, ankaŭ en la supre nomitaj. La perantoj (tradukantoj) ĉe ricevas malgrandan pagon por ĉiu tradukenda letero kaj servas kaj al privata, amikeca korespondado kaj al komerca uzo.

IKS laboras kun scio kaj konsento de UEA.

Tiel IKS estas samtempe idealista kaj praktika afero. IKS utiligas Esperanton al ne-esperantistoj, ĉar multaj personoj pro iaj kauzoj ne povas lerni Esperanton, sed tamen volas kontakti kun eksterlandanoj kial ne helpi al ili per Esperanto? Certe ni varbos multajn el ili por nia lingvo per nia IKS-servo.

Ni petas vin, la Esperantistojn, kunlabori Bonvolu skribi por detaloj al IKS-Centra-Ofico, Craiŝheim-Germanio, poŝtkesto 39.

Grava Rimarko

se iuj de niaj legantoj volas kunlabori, ili informu supran adreson kaj ankaŭ nian redakcion! Atentu! Ne forgesu!

HECTOR HOFMAN

SINT-JACOBSTRAAT 46, BRUGGE Tel. 326.21

Radio-aparatoj ĉiuspecaj lumigiloj
kaj elektraj aparatoj

10 0 0 rabato por esperantistoj.

Dringende oproep van de redactie :

Een nieuw werkjaar staat voor de deur.

Onze afdelingen en alleenstaande leden worden met aandrang verzocht om de redactie op de hoogte te stellen van leergangen, spreekbeurten en programmas van vergaderingen die zij inrichten. Dit moet in ons blad verschijnen.

De ondervoorzitter Drs. F. Roose is bereid om te komen spreken op informatieve propagandaverzamelingen.

SE VI PAROLAS PRI STROVI... VI PENSAS PRI
VIANDAĴEJO. SE VI PENSAS PRI VIANDAĴEJO... VI
AĈETAS ĈE

STROVI

Vlamingstraat, 48 BRUGGE

STROVI - Varoj :

GARANTIO pri


bona kvalito

kaj bona prizorgado

Telefono : pogranda komerco 34559

detala » 33408

STROVI estas unuaranga!



- ★ POR VIAJ EKSTERLANDAJ
TRANSPAGOJ
- ★ POR ŜANĜOJ EN LA PLEJ ALTA
KURZO
- ★ POR VOJAĜDEVIZOJ

Bank van Roeselare & Westvlaanderen

Sidejo : ROESELARE

Noordstraat, 38 Belgujo

38 Agentejoj kaj oficejoj en la tuta provinco de Okcidentflandrujo.

manufakturaĵo firma DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216.54



VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko

la perfekta konfekcio

fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj



PRECIPAJ CENTROJ:

- | | |
|------------|-------------------------|
| Antwerpen | : Aalmoezenierstr. 2 |
| | Abdijstr. 57 |
| | Anselmostr. 17 |
| | Nationalestr. 87 |
| Arlon | : Marché-aux-Légumes 16 |
| Brugge | : Breidelstr. 8 |
| Brussel | : Galerie d'Ixelles 9 |
| | Anspachlaan 194 |
| Eupen | : Kirchstr. 14 |
| Gent | : Brabantdam 25 |
| Herstal | : Rue Large Voie 4 |
| Leuven | : Bondgenotenlaan 29 |
| Luxembourg | : Place de la Gare 67 |
| Mechelen | : Grootbrug 8 |
| Roeselare | : Ooststr. 124 |
| Tournai | : Rue Royale 75 |
| Turnhout | : Herentalsstr. 6 |
| Verviers | : Pont St. Laurent 2 |

